

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 4-an de majo
Karlota prelegos ...
- Sa, la 20-an de junio
Ekskurso
- Lu, la 7-an de septembro
Elisabeth prelegos ...

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Lunde, la 6-an de aprilo, je la 20-a
en *Espace Dickens*, Laŭzano

Markus Sanz prelegos pri la *raporto Grin II*

Krokodili (la verbformo de "krokodilo") estas Esperanta idiotismo kun la signifo "en Esperanta medio paroli lingvon kiu estas la denaska lingvo de iuj ĉeestantoj". Por similaj trajtoj ankaŭ ekzistas la vortoj aligatori kaj kajmani. *Malo de krokodili* estas *gaviali* (aŭ *malkrokodili*) - "paroli en ne-Esperanta medio Esperanton, kiam alia lingvo pli taŭgus".

Foja krokodilado kun komencantoj por klarigi gramatikajn detalojn estas

akceptata. Sed multaj preferas alparoli komencantojn per simpla, malrapida Esperanto, por ke ili baldaŭ plibonigu sian lingvoscion.

Paroli en fremdlingvo por plibonigi sian scion de alia fremdlingvo en Esperanto-aranĝo estas iom pli akceptata trajto.

Pri la etimologio de la esprimo *krokodili* oni ne certas. Tamen ekzistas pluraj klarigaj teorioj. Jen unu el ili: "krokodili" devenas el la Cseh-metodo.

Kiam Andreo CSEH instruis, li ĉiam kunportis lignajn bestojn. Dum liaj kursoj neniu rajtis paroli sian gepatran lingvon, krom se tiu havis la krokodilon en la mano.

eo.wikipedia.org/wiki/Krokodili



Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; François Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Babiladaj Rondo

ambaŭgrupe:

Vendrede, la 20-an de marto
ĉe Knud kaj Marie-Antoinette
079 210 97 75
👉👉👉👉👉

Vendrede, la 24-an de aprilo
ĉe Maryse Tissot en Vevey
079 408 71 76
👉👉👉👉👉

okcidente:

Vendrede, la 10-an de aprilo
ĉe Francisko en Vallombreuse
076 411 14 55

MIA ASOCIO , MIA URBO


En 2019 UEA kun Ĉina Radio Internacia lanĉis filmkonkurson. Ĝi sukcesis varbi 35 filmojn en 15 landoj. (En jutubo «ueaviva»)

La filmo realigita de LES ricevis la 5-an premion kaj estos projekciata dum la 105-a UK en Montrealo. Plie *La Magia Lando* kaj *La Sekreta Vilaĝeto* estos ankaŭ prezentitaj al la publiko.

👉👉👉👉👉

48-a Inventista Ekspozicio en Ĝenevo

Pro kronvira epidemio la datoj de la salono pri inventistoj estas prokrastitaj al septembro – de la 16-a ĝis la 20-a. Ni atendas informojn pri la organizado.



KRIPTA FRAZO
 Rekonstruu proverbon (7, 6, 3, 2, 6) interligante apudajn literojn ekde **P** al **O** horizontale, vertikale aŭ diagonale.

P	N	T	A	E	M
A	S	I	D	M	O
O	L	O	R	L	R
R	O	F	O	E	O

EKZEMPLO
 Patro nia,
 kiu estas ...

A	P	A	S
T	T	A	K
R	I	S	I
O	N	E	U



KRIPTA FRAZO
 Pasinta doloro for el memoro

Karlo de Edmond Privat

dekkvara ĉapitro: *La profesoro de historio*

La morgaŭan tagon, la klaso de Karlo ne havis lecionon de greka lingvo, ĉar la profesoro forestis, malsana. Janko, Servetti kaj Karlo opiniis, ke ĉi tiun tagon la ŝanco ilin favoras. Sed restis la profesoro de historio, kiu sendube ion diros. Kiam, je la deknua kaj dek minutoj precize li eniris la klason, la tri kune ektimis kaj tute speciale Karlo. Sed S-ro Jehmann tuj komencis sian kurson pri la regado de l' imperiestro Trajano kaj diris nenion pri la forvago de la tri knaboj. Karlo tiom pli timis la petitan viziton je duono post la kvara.

S-ro Jehman estis tute ne riĉa kaj havis kvar junajn infanojn. Lia edzino estis bela Italino el Bolonjo. Ŝi verkis ofte artikolojn por italaj revuoj kaj gazetoj. S-ro Jehman ĉiuprintempe veturis Italujon kun ŝi, ĉe la paska libertempo. Ambaŭ estis artistoj. Ili konis en Italujo ĉiujn preĝejojn, templojn kaj palacojn, kie estas majstraj pentraĵoj.

La lastan jaron, kiam ili revenis, S-ino Jehman trinkis

glason da glacia limonado ĉe la stacio en Milano. Neniam oni sciis, ĉu tro malvarma, ĉu venenita ĝi estis. Sed post apenaŭ unu horo ŝi mortis. Estis terure. S-ro Jehman kvazaŭ bedaŭris, ke li ne ankaŭ trinkis limonadon. Sed li havis kvar infanojn. Reveninte hejmen, li devis klarigi al ili, ke sian patrino ilin neniam revidos. Nun la avino loĝadis tie kaj zorgis pri la infanoj, dum la patro instruadas. Sed S-ro Jehman perdis sian ĝojon; li nun malmulte parolis, malofte ridetis. Lia vizaĝo rapide maljuniĝis. Nur liaj brilaj okuloj montris ankoraŭ pli da bonkoreco kaj kompatemo.

Karlo pensis pri ĉio ĉi, posttagmeze, irante al lia domo. Li sonorigis ĉe la pordo. Servistino lin kondukis al la laborĉambro de S-ro Jehman.

La profesoro leviĝis kaj premante la manon de Karlo: "Davis," li diris, "mi ĝojas vin vidi tie ĉi, sidiĝu. Vi demandis min antaŭ

kelkaj tagoj pri la kluboj kaj societoj en Romo ĉe la tempo de Cicero. Jen estas du libroj, en kiuj vi trovos informojn pri tio; mi krajone notis la interesajn paĝojn. Mi jam alportis ilin por vi hieraŭ en la liceon." Karlo estis tre konfuzita. "Sinjoro," li diris, "mi dankas vin, vi estas tro bona al mi . . . Hieriaŭ mi remadis sur la rivero dum via leciono. Mi petas vian pardonon, mi certe estas tre kulpa . . ." — "Ne plu parolu pri tio," diris S-ro Jehman, "mi ja rimarkis, ke Janko, Servetti kaj vi forestis, kaj vidante la belan veteron, mi iom suspektis la veron. Mi scias, ke forvagado estas tre poezia afero kaj dolĉaĵo por liceanoj. Tamen atentu! Perdinte lecionojn, vi estos malhelpata en via studado kaj bezonos hejme laboradi pli longe. Nu, prenu la librojn kaj revenu iam min viziti. Mi ĉiam plezure kunparolos kun vi kaj vin helpos laŭpove." Korduŝite eliris Karlo kaj ekpensis, ke li neniam vidis pli bonan manieron puni lernanton.

Intervjuo de Rosario Scopelliti, Redaktoro de la informilo de LES

(Fare de Francisko)

- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.
Mi naskiĝis en Sicilio la 24-an de aprilo 1967. Mi infanaĝe loĝis en vilaĝeto (Larderia) apud Mesino. Al mi fratinas Pina kaj Katerina. Mi studis en urba universitato kaj diplomis kemiista Doktoro.
 - Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?

Mi ricevis inviton de la Universitato de Laŭzano en 1998. Dujare poste surrete mi legis pri esperanto kaj sendis mesaĝon al la secretario de LES.
 - Kiam vi decidis studi esperanton?

En 2001 mi decidis studi la lingvon kaj sekvis la kurson ofertita de Francisko.
 - Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?

Komence mi nenion diris kaj en 2004 venis en mian urbeton Francisko, lia patrino kaj amikino, kiuj parolis en esperanto kaj tiel mi klarigis pri ĝi al mia familio.
 - Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?

Mi nur konas esperantistojn en Svislando kaj amikiĝis kun ili.
 - Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?

Mi decidis partopreni la UK-on unuafoje en 2005 en Florenco. Mi plezure rememoras, ke ni ĉeestis kun alia studentino de Francisko, Marguerite Jaccard, kiu naŭdekjaraĝis tiuepoke.

